

En la tria nivelo la trajndistancigo okazas per radiofono surbaze de absoluta premsadlonga distanco (nocio 11278 en TeKu 126 sur paĝo 5, kaj en TeKu 128 sur paĝo 3).

Al la sistemo *ETCS* apartenas normigitaj aparatoj muntitaj en trako. Ili havas specialan produktnomon sen mallongigo. Por laŭpunkta datumtransigo de trako al trakciilo kaj por lokalizado de trajno estas produktataj datumtransigoj kaj lokaliziloj kun la nomo **Eurobalise**. Ili funkcias principe kiel trakmagneto, sed per pli alta frekvenco. Por kontinua datumtransigo de trako al trakciilo oni kreas pilotlineo-maŝojn kun la nomo **Euroloop**. Por Esperanto-tekstoj mi proponas la vortigojn:

(eŭropa) datumtransigilo *Eurobalise* (ĉe *ETCS*-nivelo 1)

(eŭropa) lokalizilo *Eurobalise* (ĉe *ETCS*-niveloj 2 kaj 3)

(eŭropa) datumtransigilo *Euroloop*

Por uzi tiajn produktnomojn sen antaŭa termino, oni atentu ke la nomoj ne estas Esperanto-substantivoj, do ne taŭgas por formi pluralon, akuzativon ktp.

La koncerna instalaĵo en veturiloj havas la nomon **Eurocab** kaj agas kun komputilo nomata per la mallongigo **EVC** el la angla nomo **European Vital Computer**. Jen miaj vortig-proponoj:

(eŭropa) enveturila reginstalaĵo *Eurocab* / instalaĵo *Eurocab*

(eŭropa) enveturila komputilo *EVC* / komputilo *EVC* / *EVC*

Alia baza komponanto de **ERTMS** por *ETCS*-niveloj 2 kaj 3 estas radiofonio-sistemo kun la mallongigo **GSM-R** el la angla nomo **Global System for Mobile Communication-Railway**. Por Esperanto-tekstoj taŭgas la vortigoj:

(tutmonda) radiofonio-sistemo *GSM-R* / sistemo *GSM-R* / *GSM-R*

Por sufiĉe sekurigi la datumojn, oni evoluigis ĝin per suplementaj komponantoj al la sistemo **Euroradio**. Tiu lasta produktnomo miaopinie taŭgas ankaŭ por Esperanto-nomo kun ebligo de akuzativo:

(eŭropa) radiofonio-sistemo *Eŭroradio* / sistemo *Eŭroradio* / *Eŭroradio*

Sur *ETCS*-niveloj 2 kaj 3 la trajnoj lokalizas sin per palpiloj subtenataj de lokaliziloj *Eurobalise*, kaj sendas sian aktualan lokon per *Eŭroradio* al radiofona regcentro. La centro administras la lokinformojn, reguligas la trajnsinsekvon kaj radiofonie permesas al la trajnoj veturi ĝis determinita punkto.

Karaj geamikoj, mi deziras al la kongresaj partoprenantoj agrablan vojaĝon al Parizo. Kunlaborantojn kiuj ne povos partopreni, mi afable petas antaŭe skribe aŭ rete sendi opiniojn.



Via Heinz Hoffmann

Terminara Kuriero

TeKu 130

Aprilo 2007

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 261319 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 **Nova retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de**

Jam denove retadresa ŝanĝo!

Pro konekto al moderna komunikreto, la „nova“ retadreso de sekretario *Heinz Hoffmann* laŭ TeKu 129 jam estiĝis malnova. Bonvole enlistigu la ŝupre indikitan aktualan adreson.

Datumbanka enigo sukcesa

Karaj gekolegoj, ĝoje mi informas vin, ke danke al tre efektiva helpo de kolegino *Rosalinde Taucher (UIC)* grava etapo de kunlaboro estas atingita: Sukcesis enigi en la datumbankon *RailLexic* 1085 Esperanto-difintekstojn inkluzive de eventuale necesaj terminŝanĝoj. Tiu kvanto rezultas el la aktuala stato de plurjaraj tradukado kaj diskutado en Terminara Sekcio.

Tamen la kvanto estas nur ĉirkaŭ duono de ĉiuj difinoj en *RailLexic*. Do restas sufiĉe da laboro por sekvaj jaroj. En tempo de nia kongreso en Parizo mi certe povos trakti kun sinjorino *Taucher* specialajn problemojn kiujn mi jam listigis.

UIC planas eldoni novan *CD-ROM*-disketon kun *RailLexic 4.0* por fino de 2007. Post ties apero ni traktu manieron, kiel ĉiuj terminaraj kunlaborantoj kaj aliaj interesatoj posedantaj komputilon, povos instali la datumbankan enhavon.

Alvenintaj kontribuoj

■ Por **magnetvojoj terminoj** gravas, ke intertempe alvenis jesoĵoj, uzi la vorton „trako“ ankaŭ por horizontala parto de magnet-veturvojo, nome de *Yamamoto Akiya*, *Zlatko Hinšt*, *Erik Mortensen*, *Jan Niemann*, *Henning Olsen*, *Zdeněk Polák*, *Ludoviko Sekereš* kaj *Emil Tudorache*. Sekve eblas vortigi plurajn terminojn kaj difintekstojn pri magnetvojo kun la radiko „trak-“.

■ Por iam sekva **PIV-revizio** ni konservu la difinmodifojn de „trako 2“ kaj „trajno 2“ laŭ TeKu 128, paĝo 4. Koncerne la nocion „vagono“ *Ludoviko Sekereš* proponas la difinon: Ĉiuspeca vojevigdata veturilo por transporti pasaĝerojn aŭ varojn.

■ *Ludoviko Sekereš* atentigis, ke substantivaj vortkunmetoj kun „ranĝo“ aŭ „ranĝ-“ gramatike malĝustas, ĉar el substantivigo de la verbo „ranĝi“ sole rezultas „ranĝado“, ne „ranĝo“. Sekve necesas korektoj - ankaŭ en PIV - ekzemple „ranĝostacio --> ranĝadstacio“.

■ *Marc Noulin* tradukis la francan difinon **02835-6** „*distance de freinage de service*“ (TeKu 126, paĝo 3) al: Vojo traveturata de trajno antaŭ sia halto, sekve de normala bremsado. El tio klare rezultas la termino „bremsadlongo normala“.

■ Por nocioj **08169-0** kaj **08169-1** (TeKu 128, paĝoj 5/6) *Ludoviko Sekereš* proponas la terminojn „signalo por kontraŭsenca veturo“ (08169-0) kaj „substitu-sig-nalo por kontraŭsenca veturo“ (08169-1).

■ Por nocio **11408** (TeKu 129, paĝo 3) *Zdeněk Polák* kaj *Emil Tudorache* preferas la solvon 1) „trakĉirkaŭprena (magnetvojo)“. Ambaŭ solvoj restu en diskutado.

■ Koncerne nocio **00701** (TeKu 129, paĝo 2) *Zdeněk Polák* konsentas pri ambaŭ proponitaj solvoj 1) kaj 2), dum *Ludoviko Sekereš* preferas la koncizan solvon „ĉirkulado ambaŭsenca“, kiel en pluraj naciaj terminoj. Laŭ li sufiĉas indikon de plurtrakeco en la difino. Por daŭrige diskuti tiun problemon, necesas kompari tiun nocio kun du aliaj, nome kun 00070 kaj 01686 (vidu poste).

Novaj taskoj

Por seninterrompe daŭrigi la trakton de kontraŭsenca veturado sur plurtrakaj fervojlinioj, ni komparu tri ĉirkuladsistemojn:


- Ambaŭ trakoj de dutraka linio estas ekipitaj per sekuriginstalaĵoj por ambaŭ direktoj, cele favorigi trafikajn fluecon per senrestriktaj veturoj, aŭ sur la dekstra aŭ sur la maldekstra trako.
- Okaze de konstrulaboroj ĉe unu de ambaŭ trakoj, la surveturebla trako estas provizore ekipita per sekuriginstalaĵoj por ambaŭ direktoj.
- Kaze de subite estiĝinta obstaklo sur unu de ambaŭ trakoj necesas escepta procedo por ambaŭdirektaj trajnoj sur la surveturebla trako, pro manko de koncernaj instalaĵoj.

■ La ĉirkuladsistemo a) respondas al nocio **00701**, kaj estas traktita en TeKu 129 sur paĝo 2. Terminproponoj:

- ĉirkulado dutrake ambaŭsenca
- ambaŭsenca dutrakeco
- ekspluatado dutrake ambaŭsenca

■ La ĉirkuladsistemo b) respondas al nocio **01686**:
Provizora uzo de trako por veturoj en ambaŭ direktoj.

ĉeĥa	<i>dočasný jedno kolejový provoz</i>
dana	<i>midlertidig enkeltspordrift</i>
franca	<i>circulation en voie unique temporaire</i>
germana	<i>zeitweise einleisiger Betrieb</i>
hungara	<i>ideiglenes egyvágányú közlekedés</i>
itala	<i>circolazione temporanea a binario unico</i>
pola	<i>tymczasowy ruch po jednym torze</i>
rumana	<i>exploatare temporară ca linie simplă</i>
serba	<i>privremeni jednokolosečni saobraćaj</i>



Pri kelkaj aktualaj produktnomoj ĉe fervojo

En TeKu 129 sur paĝoj 5/6 mi diskutigis, kiel trakti anglajn nomojn en informadiko. Sole kolego *Ludoviko Sekereš* respondis. Li trovas la montritan traktadmanieron kontentiga.

Por ĉi tiu TeKu 130 mi promesis prezenti kelkajn ekzemplojn pri fervojtekniko. Mi komencas la traktadon per la tre vasta nocio 11238 kun la termino „komandosistemo por ekspluatado“. *UIC* aldonis la difinon:

Tuto de ĉiuj tri hierarkiaj niveloj de fervoja sistemo:

(a) planado kaj administrado,

(b) dispozicio kaj

(c) operaciado kun regado kaj sekurigo de veturvojoj kaj veturiloj.

Speciale por estonta tuteŭropa uzo, kelkaj fervojaj entreprenoj komune konceptis koncernan sistemon kun la mallongigo **ERTMS** el la angla produktnomo **European Rail Traffic Management System**.

Por fakaj Esperanto-tekstoj menciantaj tiun sistemon, estas rekomendata la vortigo

- ĉe unua mencio en teksto: (eŭropa) komandosistemo por ekspluatado **ERTMS** (kun aŭ sen indiko de la kompleta angla nomo),

- poste pli koncize: komandosistemo **ERTMS**, sistemo **ERTMS**, aŭ nur **ERTMS**.

Sciu ke la koncepto **ERTMS** temas ne pri iu ajn komandosistemo por ekspluatado, sed pri konsisto el klare determinitaj komponantoj.

Ties ĉefa komponanto estas sistemo de aŭtomata trajnregado, evoluigita ankaŭ por unueca apliko en Eŭropo, speciale por ebligi senliman tuteŭropan uzon de trakciiloj. Ĝi havas la mallongigon **ETCS** el la angla nomo **European Train Control System**. Jen rekomendataj vortigoj en tekstoj:

(eŭropa) aŭtomata trajnrega sistemo **ETCS** / sistemo **ETCS** / **ETCS**

La koncepto **ETCS** estas determinita laŭ tri evolu-niveloj. La unua nivelo respondas al la nocio 02754 kun la termino „indukt-intermite aŭtomata trajnsekurigo“ kaj la difino de *UIC*:

Trajnsekuriga sistemo

- kontrolanta laŭpunkte per ĉetrakaj induktaj resonanciloj kaj per analogaj ĉeveturilaj ekipaĵoj plenumon de permesataj rapidoj, de necesaj bremsadoj kaj de signalataj haltoj,
- kaj okaze de misagoj aŭtomate bremsanta.

La dua kaj tria niveloj respondas al la nocio 01803 kun la termino „kontinue aŭtomata trajnsekurigo“ kaj la difino de *UIC*:

Trajnsekuriga sistemo, konsistanta el fiksa instalaĵoj (centrejo, pilotlineo entraka) kaj veturilaj instalaĵoj kun veturila anteno, kiu kalkulas la momente permesatan maksimuman rapidon kaj la distancon al ebla haltopunkto, depende de la surveturota vojo kaj de la bremsadkarakteroj de la trajno.

ĉeĥa	<i>křížovatková výhybka</i>	itala	<i>intersezione inglese</i>
dana	<i>krydsningssporskifte</i>	pola	<i>rozjazd krzyżowy</i>
franca	<i>traversée-jonction</i>	rumana	<i>schimbător englez</i>
germana	<i>Kreuzungsweiche</i>	serba	<i>ukrsna skretnica</i>
hungara	<i>átszelési kitérő</i>		

■ La dekstre simboligitan kructrakforkon koncernas la nedifinita nocio **09398** kun la korektenda ĝisnuna termino „trakokrucaĵo simple liga“.

ĉeĥa	<i>poloviční křížovatková výhybka</i>	hungara	<i>egyszerű átszelési kitérő</i>
dana	<i>halvt krydsningssporskifte</i>	itala	<i>intersezione inglese semplice</i>
franca	<i>traversée-jonction simple</i>	pola	<i>rozjazd krzyżowy pojedynczy</i>
germana	<i>einfache Kreuzungsweiche</i>	rumana	<i>traversare jonctiune simplă</i>
		serba	<i>prosta engleska skretnica</i>

Terminproponoj:

- 1) kructrakforko unubranĉa
- 2) kructrakforko unuflanka
- 3) kructrakforko unudevia



■ La dekstre simboligitan kructrakforkon koncernas la nedifinita nocio **09393** kun la korektenda ĝisnuna termino „trakokrucaĵo duoble liga“.

ĉeĥa	<i>celá křížovatková výhybka</i>	hungara	<i>kettős átszelési kitérő</i>
dana	<i>helt krydsningssporskifte</i>	itala	<i>intersezione inglese doppia</i>
franca	<i>traversée-jonction double</i>	pola	<i>rozjazd krzyżowy podwójny</i>
germana	<i>doppelte Kreuzungsweiche</i>	rumana	<i>schimbător englez dublu</i>
		serba	<i>dvostruka ukrsna skretnica</i>

Terminproponoj:

- 1) kructrakforko dubranĉa
- 2) kructrakforko duflanka
- 3) kructrakforko dudevia




■ La lasta grave traktinda nocio en ĉi tiu TeKu estas **09805**:

Trako kiu, alie ol ĉeftrako, estas ĝenerale uzata por manovraj veturoj.

ĉeĥa	<i>vedlejší kolej</i>	itala	<i>binario di servizio</i>
dana	<i>sidespor</i>	pola	<i>tor boczny</i>
franca	<i>voie accessoire</i>	rumana	<i>linie alăturată</i>
germana	<i>Nebengleis</i>	serba	<i>sporedni kolosek</i>
hungara	<i>kezelő vágány</i>		

Terminproponoj:

- 1) servotrako (ĝisnuna termino)
- 2) trako neĉefa
- 3) trako manovra



Terminproponoj:

- 1) cirkulado provizore unutraka
- 2) ekspluatado provizora unutraka (ĝisnuna termino)
- 3) trafiko portempe unutraka

Laŭ PIV la adjektivoj „provizora“ kaj „portempa“ estas sinonimaj kun jena klarigo: Destinata por nelongdaŭra uzo, sed anstataŭota de definitiva.

■ La cirkulad sistemo c) respondas al nocio **00070**:

Ambaŭdirekta trafiko sur unu trako de dutraka fervojlinio, restrikte okazigita pro obstakloj sur la najbara trako.

ĉeĥa	<i>jízda proti správnému směru</i>	hungara	<i>helytelem vágányon történő közlekedés</i>
dana	<i>kørsel på forkert spor</i>	itala	<i>circolazione su binario falso</i>
franca	<i>acheminement à contre-sens</i>	pola	<i>jazda po niewłaściwym torze</i>
germana	<i>Befahren des Gleises der Gegenrichtung</i>	rumana	<i>parcurea liniei pe sens contrar</i>
		serba	<i>vožnja napravnim kolosekom</i>

La ĝisnuna termino „trafiko kontraŭsenca“ sole taŭgas por la ĝeneraltrafika nocio 08970, ne difinita en *RailLexic*.

Terminproponoj:

- 1) cirkulado perturbkaze unutraka
- 2) trafiko perturbkaze unutraka

Pri malriglado de itinero (TeKu 127, paĝoj 5/6) ekzistas du pliaj terminoj, kiuj laŭ la difino koncernas ne sole itineron, sed ankaŭ aliajn teknikajn procedojn.

■ nocio **05003** kun la ĝisnuna termino „itinernuligo urĝ (bezona)“:

Mekanismo funkciigebla sub determinitaj kondiĉoj, por manipuli perturbitan aparaton.

ĉeĥa	<i>nouzové uvolnění</i>	itala	<i>liberazione artificiale</i>
dana	<i>nødopløsning</i>	pola	<i>zwolnienie doraźne</i>
franca	<i>libération de secours</i>	rumana	<i>anulare de parcurs în caz de nevoie</i>
germana	<i>Hilfsbedienung</i>	serba	<i>prinudno razrešenje puta vožnje</i>
hungara	<i>kényszerfeloldás</i>		

Terminproponoj:

- 1) substitua funkciigilo
- 2) substitua manipulilo

■ nocio **05004** kun la ĝisnuna termino „itinernuligo prokrasta“:

Aparato ebliganta manipuli alian aparaton nur post antaŭfiksita tempolimo.

ĉeĥa	<i>uvolnění se zpožděním</i>	itala	<i>liberazione a tempo</i>
dana	<i>forsinkel opløsning</i>	pola	<i>zwolnienie zwłoczne</i>
franca	<i>libération temporisée</i>	rumana	<i>declanșare manuală temporizată</i>
germana	<i>verzögerte Auflösung</i>	serba	<i>usporeno razrešenje</i>
hungara	<i>időzített feloldás</i>		

Terminproponoj:

- 1) prokrastiga funkciigilo
- 2) prokrastiga manipulilo

Al kelkaj signalilpecoj (ĉefsignalilo, antaŭsignalilo, ripetosignalilo) apartenas signoplatoj, precipe gravaj por karakterizi lumsignalilojn.

■ Nocio **06365** koncernas ĝeneralan tian platon:

Plato fiksita sur signalilo por precizigi la ĉefajn karakterizaĵojn de tiu signalilo.

ĉeĥa	<i>světelnová deska návěstidla</i>	itala	<i>targa identificatrice di segnale</i>
dana	<i>tavle med kendingsbogstaver</i>	pola	<i>tabliczka identyfikacji sygnału</i>
franca	<i>plaque d'identification d'un signal</i>	rumana	<i>inscripția semnalului</i>
germana	<i>Erkennungsplatte eines Signals</i>	serba	<i>pločica za obeležavanje signala</i>
hungara	<i>azonosító tábla</i>		

Terminproponoj:

- 1) **signalilkoniga ŝildo** (ĝisnuna termino)
- 2) **signalilidentiga plato**
- 3) **signalilkarakteriza plato**

Jen PIV-klarigoj:

plato 2a Ebena, rigida, maldika peco el metalo.

ŝildeto Ĉia malgranda plato, surportanta iujn identigajn informojn.

■ Specialan tian platon koncernas nocio **05580-0**:

Plato por marki lokon de antaŭsignalilo.

La nacilingvaj terminoj estas miksitaj inter nocioj 05580-0 kaj 05580-1 (vidu tie). Ankaŭ la ĝisnuna Esperanto-termino „avertilo antaŭsignalila“ ne klare esprimas, pri kiu nocio temas. Terminproponoj:

- 1) **antaŭsignalila koniĝŝildo**
- 2) **antaŭsignalila identigplato**
- 3) **antaŭsignalila karakterizplato**

■ Memstaran signalplaton koncernas nocio **05580-1**:


Signalilo por anonci sole starantan antaŭsignalilon,

kun signalsignifo: „Antaŭsignalilo atendenda“.

ĉeĥa	<i>upozorňovadlo (pro předvěst)</i>
dana	<i>optisk afstandssignal; afstandsmærke</i>
franca	<i>poteau avertisseur de signal; mirilton (signalisation)</i>
germana	<i>Vorsignalfafel; Vorsignalbake</i>
hungara	<i>előjelzőre figyelmeztető tábla</i>
itala	<i>tavola di orientamento; posto avvertitore di segnale</i>
pola	<i>wskaźnik ostrzegawczy; nieruchoma tarcza ostrzegawcza kształtowa</i>
rumana	<i>baliză</i>
serba	<i>predsignalna opomenica (ploča)</i>

Terminproponoj:

- 1) **antaŭsignalila anoncoŝildo**
- 2) **antaŭsignalila anoncoplato**



vico de signoplatoj laŭ germana aspekto

Lige kun ĉi tiu temo traktindas signalilo, sur kiu estas fiksita alia koniĝŝildo (ne en *RailLexic*). Tute alia signalo ankaŭ estas diskutinda.

■ nocio **08227**:

Signalilo lokita inter antaŭsignalilo kaj nur malfrue videbla ĉefsignalilo, por ripeti la indikon de la antaŭsignalilo.

ĉeĥa	<i>návěstní opakovač</i>	itala	<i>segnale ripetitore</i>
dana	<i>repetitionssignal</i>	pola	<i>powtarzacz sygnału</i>
franca	<i>signal répétiteur</i>	rumana	<i>repetitor de semnal</i>
germana	<i>Signalwiederholer</i>	serba	<i>ponavljач signala</i>
hungara	<i>ismétlőjelző</i>		

Terminproponoj:

- 1) **ripetosignalilo** (ĝisnuna termino)
- 2) **signalilo ripeta**
- 3) **antaŭsignalilo ripeta**

■ nocio **08204**:

Signalilo prezentata al trakielestro per movataj brakoj, kun aŭ sen manflago aŭ manlanterno.

ĉeĥa	<i>ruční návěstidlo</i>	itala	<i>segnale a mano</i>
dana	<i>håndsignal</i>	pola	<i>sygnał dawany ręcznie</i>
franca	<i>signal à main</i>	rumana	<i>semnal de mână</i>
germana	<i>Handsignal</i>	serba	<i>ručni signal</i>
hungara	<i>kézi jelzés (jelzőesz közzel)</i>		

Terminproponoj:

- 1) **mansignalo** (ĝisnuna termino)
- 2) **brakmova signalo** (kompare kun „braksignalilo“ = 07945)

Jam en TeKu 115 estas traktitaj trakforkoj kaj trakokrucaĵoj. La termino „trakokrucaĵo“ erare troviĝas ĉe tri nocioj, nome 02287, 09392 kaj 09404. La lasta ne estas traktinda pro manko de necesaj nocioj informoj.

■ Sole nocio **02287** estas en *RailLexic* difinita, nome:

Krucaĵo de du samnivelaj trakoj, kie ne eblas veturo de unu trako al la alia.

Sekve la termino „trakokrucaĵo“ klare ĝustas.

ĉeĥa	<i>oblast srdcovky</i>	itala	<i>deviatoio</i>
dana	<i>krydsningsparti</i>	pola	<i>obszar krzyżownicy</i>
franca	<i>croisement</i>	rumana	<i>încrucișare</i>
germana	<i>Kreuzung</i>	serba	<i>ukrštanje (koloseci)</i>
hungara	<i>keresztés</i>		

■ Laŭ naciaj terminoj la nedifinita nocio **09392** koncernas kombinaĵon el trakforko kaj trakokrucaĵo. En la 54-a IFEF-kongreso (*Plovdiv*, 2002) nia sekcio decidis por tiu kombinaĵo la terminon „**kructrakforko**“ (TeKu 117, paĝo 3). Ties analizo povas esti „trakforko (en formo) de kruco“. Al la ĉeestintoj ne plaĉis proponita disigo per adjektivo „kruca“, „krucaĵa“ aŭ „krucaĝa“.